Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

# IPR
## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 35 - trimonata
05/1

**Redakta Komitato:**
Jozefo Németh (red.)
Katalin Kováts (vicred.)
Luigia Oberrauch Madella

**Kunlaborantoj de la aktuala numero:**
Félix García Blázquez
Aida Cizikaite
Renato Corsetti
Stefan MacGill
Maritza Gutiérrez González
Vittorio Madella
Tatjana Mensova
Radojica Petrovic
Atilio Orellana Rojas
Blazio Vaha
Josef Vojácek




ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

## ENHAVO


Renato CORSETTI: *Kiu volas, iru. Kiu ne volas, sendu!* ........ 3
Josef VOJÁČEK: *Projektoj por E-instruado* ........ 6
Tatjana MENŜOVA: *Socioniko dum 45 minutoj* ........ 10
Félix GARCÍA BLÁZQUEZ: *Galimatiaj reguloj* ........ 17
*Agrabla enkondukilo* (recenzo de Stefan MACGILL) ........ 18
*El la landoj kaj sekcioj* (AU, BR, DE, HU, IT, HR, CU, US) ........ 20
*Al la ILEI-sekcioj kaj Landaj Asocioj de UEA* (Maritza GUTIÉRREZ) ........ 28
*Nekrologo pri Laurynas Algimantas SKŪPAS* (Litova E-Asocio) ........ 29
*38-a Konferenco de ILEI* (Informoj, aliĝilo) ........ 31


## ESTRARO DE LA LIGO


**Prezidanto**: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, SCG-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381) 32 371053. Fakso: (+381 32) 342 101, radp@ptt.yu*
Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto Interkulturo.

**Vicprezidanto**: Stefan MacGill, *Pannonia u. 30. I/6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, stefan.macgill@galamb.net*
Eldonado (inkl. periodaĵojn), Int. Infana Kongreseto (komisie de UEA)

**Sekretario**: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel.: (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <ieiOO1@tiscali.nl>*. Konferencoj.

**Vicsekretario:** *vakas*

**Estrarano pri financoj**: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*

**Estrarano:** Hokan Lundberg, *c/o stan Pivalica, Tadeuša Košćuška 80/18, SCG-11000 Beograd, Serbio. Tel. (+381 11) 188 496, hokan@ikso.net*
Retprojektoj, junulara agado, informado.

**Estrarano**: Mauro La Torre, *Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.* Tel.: *(+39) 06 44 62 092* aŭ *06 49 57 805*, fakso: *(+39) 06 49385673, mauro.latorre@uniroma3.it; http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/*
Universitata kaj scienca agadoj.

**Estrarano:** Aleksandr Blinov, *Pr. I. Jakovleva 10A-63, RU-428027 Ĉeboksari, Rusio. Tel.: (+7 8352) 665 908, delfeno@chtts.ru*
Lerneja agado, instrukapabligo, ekzamenoj .


*Titolpaĝe: Nur kelkaj ekzemploj el la gamo de nuntempaj E-lerniloj...*
*(foto de Katalin Kováts)*



**Renato Corsetti**

# *Kiu volas, iru. Kiu ne volas, sendu!*

## – Esperanto por Evoluo –

Kamparana proverbo de mia vilaĝo diras "*Kiu volas* [ke io efektive okazu], *iru* [mem]. *Kiu ne volas* [ke io okazu], *sendu* [iun alian]!". Tio samas je la konata politikista diro: "*Ni starigu komisionon*!", kiam oni ne volas solvi problemon.

Sed kiel tiu proverbo rilatas al Esperanto kaj eĉ pli al la kampanjo **Esperanto por Evoluo**? Kaj kiu finfine estas nia laboro?



Nia laboro estas konigi E-on al la mondo kaj instrui ĝin, ĉar ni asertas, ke ne estas juste, ke en la kampo de lingvoj kaj kulturoj validu la tiel nomata ĝangala leĝo, pro kiu la granda lingvo englutas la malgrandan. Ĉio cetera sekvas el tio.

Alivorte ni taksas la nunan internacian lingvan ordon, la manieron laŭ kiu nuntempe oni utiligas nur difinitajn lingvojn por la rilatoj inter homoj apartenantaj al malsamaj popoloj, nekontentiga kaj nekongrua kun la bezono favori interkompreniĝon, pacon kaj samrajtecon inter ĉiuj homoj.

Ĉiu homo devus esti protektata de la *Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj* kontraŭ diskriminacioj surbaze, interalie, de lingvo kaj neniu nacia aŭ internacia instanco rajtus malobservi tiun rajton surbaze de konsideroj pri efikeco aŭ alispecaj konsideroj, kaj tamen oni daŭre diskriminacias surbaze de lingvoj.

Al nenio ŝajne utilis la fakto, ke *Unesko* kaj *Unuiĝintaj Nacioj* jam produktis multajn dokumentojn en ĉi tiu kampo.

La lasta *Raporto pri la Homara Evoluo 2004*, ekzemple, estas tute aprobinda kaj prezentas pozitive la principon de la uzado de tri lingvoj plurfoje rekomenditan de *Unesko*:

– gepatra lingvo (kiom ajn malgranda ĝi estas)

– loka kontakt-lingvo (ĝenerale la nacia lingvo)

– lingvo por internaciaj kontaktoj.

Iusence iu alia komencis fari la laboron por ni, kaj atentigi pri lingvaj diskriminacioj kaj pri eblaj solvoj. Sed, kiel antaŭvidas la kamparana proverbo, tiuj aliaj faras nur parton de nia laboro, ĉar kiam ili skribas pri lingvo por internaciaj kontaktoj, vi jam komprenas, pri kio ili pensas.

Se estus ni, kiuj farus mem la laboron, ni certe asertus ke la optimuma lingvo por la rolo de internacia lingvo estas la internacia planlingvo Esperanto, ĉar la uzo de kiu ajn alia nacia lingvo estas maljusta, kaŭzas homajn suferojn kaj kaŭzas perdon de mono flanke de la lernantaj socioj kaj en la longa daŭro morton de lingvoj kaj de kulturoj.

La menciita raporto montras tre klare per ciferoj, la pozitivan efikon de la instruado de gepatraj lingvoj (eĉ kiam ili estas multaj) kompare kun la instruado de la ekskoloniaj lingvoj.

Ni asertas, ke la samo validas ankaŭ pri la instruado de novkoloniaj lingvoj (ekzemple la angla en Eŭropo). Se oni instruas tiujn nov-koloniajn lingvojn kiel fremdajn lingvojn, anstataŭ instrui la neŭtralan internacian lingvon Esperanto, oni malŝparas multan monon por malmulta rezulto.

Ni asertas, ke la instruado de Esperanto kiel fremda lingvo estas avantaĝa kompare kun la instruado, ekzemple, de la angla (pli granda facileco kaj sekva atingo de la lernoceloj en ono de la tempo, pli malmultekosta instruado pere de lokaj instruistoj kaj lokaj materialoj).

Ni opinias, ke la ŝparoj realigeblaj per la transiro de, ekzemple, la angla al Esperanto en la instruado de fremdaj lingvoj en la mondo kunportus tiom gigantajn ŝparojn, ke ili sufiĉus por venki kelkajn el la problemoj de malsanoj, malsato kaj de starigo de sistemoj de kvalita instruado, por kiuj nuntempe mankas rimedoj.

Sed ne plu sufiĉas aserti kaj deklari. Ni tiom multe asertis kaj deklaris dum unu jarcento! Ni devas nun pruvi tion. Al tio devas utili la plano **Esperanto por Evoluo**, kiu konsistas el kelkaj difinitaj eroj kaj tavoloj:



A – *tavolo diplomata/prestiĝa*: *UEA* kaj *ILEI* petu *Uneskon* kaj *UN* subteni/aŭspicii/esprimi sin favore al eksperimentoj farotaj en pluraj landoj sub scienca kontrolo pri la lernofacileco kaj la lernorezultoj de Esperanto kompare kun aliaj fremdaj lingvoj.

B – *tavolo scienca*: konataj fakuloj internaciaj difinu la kondiĉojn kaj la celojn de la farotaj eksperimentoj en la partoprenantaj landoj, gvidu la realigadon, analizu la rezultojn kaj poste diskonigu ilin.

C – *tavolo landa*: ĉiu landa asocio de *UEA* kunlabore kun la landa sekcio de *ILEI* aŭ inverse trovu almenaŭ unu klason, en kiu oni povas instrui Esperanton, kaj unu kongruan klason, en kiu oni instruas fremdan lingvon, kaj organizu la instruadon kaj la testadon laŭ la gvidlinioj de la internaciaj gvidantoj de la eksperimentoj, kaj laŭeble en kunlaboro kun landa universitato aŭ sciencisto. Kompreneble oni devas ankaŭ influi sian *Unesko-komisionon* kaj sian *Ministerion pri Eksterlandaj Aferoj*, por ke ili apogu la agadon indikitan en la punkto *A*. Internaciaj interŝtataj organizaĵoj moviĝas nur se ili estas premataj de la membro-ŝtatoj.

D – *tavolo rilate kaj gvide kunordiga*: devos evidente ekzisti ĉe UEA aŭ ĉe ILEI kelkaj laborantoj, kiuj faras la amasegon da kontaktoj necesaj kun ĉiuj esperantistoj tra la landoj, kiuj kunlaboras, kaj iel funkcias kiel perantoj inter ili kaj la scienca tavolo. Ĉio tia postulas evidente la trovon de adekvataj financaj subtenoj en aŭ ekster la movado.

Al kio utilas ĉio ĉi? Vi certe rajtas demandi kaj temas pri la kerna demando. Ĉio ĉi utilas por pluraj samtempaj celoj: – refunkciigi en la kampo la landajn asociojn kaj sekciojn, en kelkaj el kiuj regas rezignacio (ĉiuj volas lerni la anglan), kaj en kelkaj el kiuj, ĉefe en la ekonomie malfortaj landoj, neniam okazis eksperimentoj pri Esperanto, – informi pri E-o je ĉiuj niveloj de la internacia al la loka en la daŭro de ĉi tiu agado, – montri al tiuj, kiuj ne volas scii, kiom pli facile oni lernas E-on en ĉiuj kondiĉoj (tio estas nia scienca ekira hipotezo: ĉiuj lernas E-on pli facile ol ili lernas iun ajn alian fremdan lingvon).

Finfine, ni havas la devon atesti antaŭ la mondo, ke ili estas irantaj malĝustan vojon, ĉar ni ja scias, ke ili iras en malĝustan vojon. Nun ankaŭ internaciaj instancoj iom mallaŭte komencas diri tion. Ni helpu ilin pri la respekto de lingvaj homaj rajtoj kaj ni helpu nin mem pri Esperanto.

## Josef Vojáček

# Projektoj por E-instruado

*Aktualigita prelego por ILEI konferenco en Bratislava 14.-21.8.2004*

**Enkonduko**

Ni ĉiuj scias, ke Esperanto kompare al naciaj lingvoj ne estas subtenata per politika kaj ekonomia fortoj de iu ŝtato. Pro tio por pli larĝa disvastigo kaj uzado de la lingvo ofte mankas mono. Tiam estas grave akiri monon el eksteraj fontoj, ekzemple el diversaj projektoj, kio ne estas facila. Mi ne volas fanfaroni, tamen montri eblecojn je ĉi tiu vojo donante superrigardon kaj priskribon de projektoj, kiujn mi preparis kaj kiuj estis aŭ ne estis akceptitaj. Plue mi aldonas informon pri preparataj projektoj.

**La jaroj 2001 kaj 2002**

Ĉio komenciĝis en la jaro 2001, kiam *Ministerio de Lernejoj* (MŠMT) anoncis programon por preparo de evoluaj kaj transformaj projektoj. Inter la temoj estis ankaŭ preparo de novaj studobjektoj. Mi preparis por studentoj projekton por instruado de E-o en nia fakultato (pedagogia fakultato de universitato Masaryk en Brno). Ĉi tiu projekto estis daŭrigota por tri jaroj. Plue lernejaj oficejoj anoncis regionajn programojn por plua klerigado de pedagogoj (DVPP) por la jaro 2001. Mi preparis ankaŭ projekton sub la titolo „Lingvaj kursoj por instruistoj". Ĉi tiuj du projektoj estis aprobitaj por la jaro 2001. Instruado en la kurso por instruistoj komenciĝis pro malfrua aprobo nur en printempa semestro 2002 kun partopreno de ses instruistinoj, la kurso por studentoj komenciĝis en aŭtuna semestro 2002, antaŭa tempo estis por ĝia preparo. Por instruado estis aĉetitaj videokurso *Mazi en Gondolando* kaj lernolibroj de IEI, videomagnetofono kaj televidaparato, estis abonitaj E-gazetoj kaj aĉetitaj libroj je kelkmil kronoj[1]. Mi preparis lernotekstojn al unuopaj lecionoj kaj aldonis ĉapitron pri Esperanta literaturo.

En la jaro 2002 mi petis daŭrigon de la projektoj. Por kurso por studentoj ne estis problemo rilate de aprobo. Por instruistoj mi devis prepari novan projekton, sed ĝi pro manko da mono ne estis akceptita, malgraŭ bona taksado. Progresa kurso por instruistoj, spite de tio, okazis en aŭtuna

---

[1] 1000 CZK egalas al ĉ. 32 EUR/43 USD (vd. *http://www.xe.com/ucc/*) NdlR



semestro 2002 kun kvar partoprenantinoj, sen neceso de plua mono. La kurson por studentoj mi modifis – ĝi estis dividita je tri partoj – E1 por komencantoj (*Mazi*), E2 – por progresantoj laŭ lernolibro de *Wiliam Auld: Paŝoj al plena posedo* kaj E3 – dumferia konversacia kurso en *Somera Esperanto Tendaro* (SET) en Lančov en suda Moravio ĉe Vranov-a digolago. Al lernotekstoj mi aldonis ekzercojn kaj kelkajn kantojn inkluzive de notoj. En la aŭtuna semestro 2002 aliĝis al la kurso E1 15 studentoj, el kiuj restis ok kaj por la sekva printempa semestro 2003 nur ses kaj neniu elektis konversacian kurson E3.

Por ke la studentoj havu tuj ankaŭ praktikan aplikadon de novlernita lingvo, mi preparis por la jaro 2003 projekton de nova studobjekto „Klerig-kibernetiko", instruatan en E-o laŭ kurso de profesoro H. Frank, publikigitan en la 11-a volumo de *Kybernetische Pädagogik* kaj en interreto. Por la jaro 2003 mi denove havis du aprobitajn projektojn. En la aŭtuna semestro 2003 partoprenis en la kurso de Klerigkibernetiko nur unu studentino.



*Surfote: Sandor Horváth (AU), Josef Vojáček (CZ) kaj Volodimir Hordienko (UA) dum la 37-a konf. de ILEI en Bratislavo*

**La jaroj 2003 kaj 2004**

Por larĝigi la financadon de la E-kursoj mi preparis por la jaro 2003 projekton „Kursoj de Internacia lingvo Esperanto“ por *Kleriga Fondaĵo de Johano Hus* (VNJH), kiu ne estis akceptita pro limigitaj monrimedoj.

Mi ankaŭ strebis iniciati kurson por instruistoj en pedagogia fakultato de universitato en Hradec Králové, kiun mi envicigis en tiujn neaprobitajn projektojn DVPP kaj VNJH. La kurso tamen sukcese komenciĝis en la printempa semestro 2003 kun ok partoprenantoj kaj gvidis ĝin inĝeniero *Polák*. Sed en la sekva semestro ili jam pro okupiteco ne daŭrigis en kurso por progresantoj.

Plue mi preparis projekton „Kurso de Esperanto por progresantoj“ por „*Fonduso por disvolvo de altlernejoj*“ (FRVŠ). En la projekton mi enkalkulis stipendion por studentoj de dumferia konversacia kurso en SET, ĉar en la antaŭa projekto ne estis rubriko por stipendio. Montriĝis, ke eblas aljuĝi stipendiojn nur por staĝoj kaj ne por kursoj. Tial la projekto estis elvicigita pro neadekvataj financaj postuloj.

Por la ferioj 2003 MŠMT anoncis projektojn de lingvaj kursoj por instruistoj sen rajtigilo de lingva instuado. Mi preparis projekton por kurso de Esperanto, sed mi ricevis respondon, ke la projekto ne povas esti akceptita, ĉar oni pensis pri instruataj lingvoj (angla, germana, franca), kio ne estis inter la kondiĉoj emfazita, ĉar oni ne supozis, ke iu proponus alian lingvon. Do, almenaŭ venis al la ministerio vivsigno pri E-o.

Mi volis kunlabori kaj subteni (precipe finance) iniciaton de grupeto, kiu laboris je interreta kurso de E-o laŭ lernolibro de Theodor Kilián. Projekto por FRVŠ, preparita por la jaro 2004, estis nek elvicigita, nek malaprobita, sed ĝi estis envicigita inter la nefinancatajn projektojn.

La kurso – ankoraŭ ne komplete sonigita – troviĝas en la hejmpaĝo *http://esperanto.czechian.net/ucebnice/.*

Dum la aŭtuna semestro 2003 frekventis la kurson E1 11 studentoj, por E2 dum la printempa semestro 2004 restis kvar kaj du partoprenis konversacian kurson E3. Unu aliĝis ankaŭ al kurso de Klerigkibernetiko por aŭtuna semestro 2004 kune kun pliaj 42 studentoj, sed ili verŝajne ne rimarkis, ke la instruado devis okazi en E-o. Almenaŭ mi povis rekomendi al ili aliĝi al kursoj E1 (al kiu aliĝis 30 studentoj), E2 kaj eventuale E3 kaj sekvontjare denove aliĝi al Klerigkibernetiko. Kurson E1 finis en la aŭtuna



semestro 2004 per studkontrolo 14 studentoj kaj la sola, kiu restis por Klerigkibernetiko, malaliĝis. Eble ŝi daŭrigos kun la nunjaraj aliĝintoj.

En la lernojaro 2003/2004 mi intencis fondi kaj gvidi en fakultata bazlernejo interesrondeton *Interkulturo*. Por financa subteno mi preparis kadre de programo „*Subteno de klerigado en lingvoj de nacimalplimultoj kaj multkultura edukado*” en la jaro 2004 projekton „Interesrondeto Interkulturo”. Ankaŭ ĝi ne estis akceptita. Aliĝis nur du gelernantoj, tial mi prokrastis la komencon al la sekva jaro. Ekinteresiĝis sep aliaj gelernantoj, el kiuj verŝajne restos tri.

Por la jaro 2004 mi denove petis daŭrigon de ambaŭ projektoj (kursoj de Esperanto kaj Klerigkibernetiko), sed ili ne estis akceptitaj. Antaŭe estis la projektoj elektataj kaj aprobataj de la Ministerio kaj en 2004 tion faris rektorejo, kie oni ne favoras E-on.

**Preparataj projektoj**

*Komitato por Eksperimentado pri Internacia Lingvo en Eŭropa Unio* (KEILEU) preparas projekton por instruado de Esperanto en lingve miksitaj grupoj por 11-14 jaraj gelernantoj el apudlimaj urboj laŭ similaj kursoj de s-ro Tisljar kun partopreno de slovenaj kaj aŭstraj gelernantoj laŭ Zagreba metodo.

Mi intencis prepari por la programo „Leonardo da Vinci” projekton por instruado de fakaj studobjektoj en E-o al miksitaj grupoj de diversnaciaj universitataj studentoj cele uzi la internacian lingvon E-o (kiun studentoj lernos dum relative mallonga tempo), por la instruado en lingve miksita studenta kolektivo. En ĝi necesos kunlaboro de profesoroj kaj docentoj de AIS. Sed la programo „Leonardo da Vinci” estas orientita prefere al merkato de laboro, do pli praktike ol konsiderata teoria instruado, tial la projekto ne havis ŝancon esti akceptita. Mi nun serĉas alian eblecon, kie la projekto estos pli konvena. Samtempe necesas prepari reton de universitatoj kaj altlernejoj por kunlaboro, el kiuj venos studentoj.

**Konklude**

Kiel mi jam diris komence, preparo kaj realigo de projektoj ne estas facila afero, sed tio estas utila kaj necesa por la disvastigado kaj utiligado de E-o. Se sukcesos tiuj du laste menciitaj projektoj, estos por Esperanto granda kaj grava paŝo antaŭen.

# Tatjana Menŝova: Socioniko dum 45 minutoj[2]

Moskvo, 2000
*tradukis Dmitrio Lytov, <socion@hotbox.ru>*
*kaj Aleksandro Galkin, <fafaw@yandex.ru>*

*En du antaŭaj artikoloj [1, 2] ni rakontis al vi pri Socioniko (la teorio de prognozo de homaj interrilatoj sur la bazo de iliaj psikologiaj tipoj). Ni rakontis pri la 16 tipoj kaj iliaj pseŭdonimoj – **Majstrulo, Serĉulo** ktp. El ĉi tiu artikolo vi povas ekscii, kiel vi povos identigi la tipojn en la vivo, kaj pri la rilatoj inter ili – uzante kiel ekzemplon kutiman rusan mezlernejan klason 8-B.*

***

Jen sonoras la lerneja sonorilo, kaj mi havas nur 45 minutojn, por ke miaj lernantoj faru ankoraŭ unu paŝon antaŭen pri siaj akademiaj scioj, aŭ eble – plu ekkonu sin kaj ĉirkaŭulojn. Kia estos ĉi tiu paŝo, ĉu granda aŭ eta, kien – antaŭen aŭ flanken, ĉu eĉ reen – dependas de la cirkonstancoj, de mi kaj de… Socioniko.

Ni fantaziu malmulte: jen ili estas antaŭ vi – gajaj kaj seriozaj, ruzaj kaj simplanimaj, frue adoleskintaj kaj "ĉiamaj infanoj" – ĉiuj ili nomiĝas **klaso**, ekzemple 8-B. Kutime kolegoj opinias pri ili egale: "bona klaso " aŭ "malbona klaso". Iufoje okazas diverseco: "tre bruaj, sed aktivaj" aŭ "ili estas trankvilaj, kvietaj, sed faras nenion" ktp. Iufoje la opinioj de kolegoj diversas: "Tamen dum miaj lecionoj ili estas aliaj [kondutas alimaniere]..." Tuj sekvas pedagogia disputo. Kial klasoj estas "diversaj" kaj kial diversas la opinioj de la pedagogoj pri ili?

Ni provu ekkompreni. Antaŭ vi estas la brua, memvola kaj nepacienca klaso 8-B – kial ĝi estas tia? Nia esploro de la klaso evidentigas, ke la plej multnombraj tipoj estas malraciaj ekstravertuloj – uloj de nepacienca karaktero, kaj grandaj amantoj de amuzaĵoj. Kiel ĉiuj ekstravertuloj, iliaj pensaj procesoj estas "en gamboj", t.e. ili ne povas lerni sidante senmove dum ĉiuj 45 minutoj. Interese, ke la infanoj mem sufloras al la instruisto, kiel li devas trakti ilin: "Permesu, ke mi forviŝu la tabulon? Permesu, ke mi disdonu...? Permesu, ke mi...?" Eĉ cedu al la petanto – li tutegale ne sukcesos trankvile sidi. Inter ili multaj ofte deflankiĝas for de la temo (sed ne for de la propraj pensoj!). "Vagado" kun tiuj infanoj "iomete flanke de la

[2] 45 minutoj – kutima daŭro de leciono en la mezlernejoj de Rusio.



ĉefa temo" okupos ne tiel multe da tempo, sed ŝparos multajn fortojn, kiujn oni povas malŝpari por "unuformigi kaj unuliniigi" malobeemulojn.

Nun bonvolu imagi vin en la rolo de pedagogo. Imagu, ke vi estas *racia introvertulo*. Vin agacas vantado, tumultado de "amantoj ion forviŝi aŭ alporti", vin malkuraĝigas konstanta "deflankiĝado" de la "promen-amantoj" ktp. Kiel vi tiam "nomos" ĉi tiun klason dum pedagogia kunsido? Korekte, korekte! Aldonu ankoraŭ iomete da malflataj kaj tute ĝustaj pikaĵoj? Tamen ĉu vi devas tiel stresiĝi? Ja vi ne ĉiam havas eblon elekti. Jen komenciĝas la serĉo de la "ora mezo" – "sataj lupoj" kaj "netuŝitaj ŝafoj".

Oni diras, ke korekte farita diagnozo estas la duono en kuraco de la malsano. La difinado de personaj ecoj de ĉiu lernanto, kvalita pritakso de la klaso ĝuste estas tia "diagnozo". Tiam restos nemulte: ekposedi la teorion kaj apliki ĝin praktike.

Ankoraŭ iom da vortoj pri la teorio kaj la praktiko, pli precize – metodoj de ekposedo de novaj scioj. Ekzemple, antaŭ vi estas granda majstro almeti siajn manojn al ĉio kaj ĉiuj. Viaj "saĝaj vortoj" kaj "interesaj bildoj" por li estas vana sono kaj nebezona falsbrilaĵo. "Per kio vi pensas, junulo?" – certe, per manoj! Donu al li ion malmunti, aliokaze vi riskas, ke poste mankos... piedo al la tablo!

Kaj jen estas amanto rigardadi tra la fenestro. Priatentu lin, kaj konvinku lin, ke nur vi povos solvi por li la problemon de la mondkoncepto – "bildigu" por li la mondon entute, kiel ĝi "vere" estas, kaj – antaŭen, de sur la "ĉielo" suben al la "tero"! Li devas finfine ekkompreni, al kio vi "kliniĝas".

Kaj tiu "adepto de bongusta kaj sana vivo" devas bone vidi, aŭdi, ke la vento ne blovu el fenestro, ke matenmanĝo ne estu malvarma, ke... Jes, do vi estu vestita en belaspekta robo, kaj desegnu sur la tabulo per koloraj kretetoj belajn bildetojn...

"Oni ne povas plaĉi al ĉiuj" – diros vi. Komence ni penu plaĉi almenaŭ al iu ajn, kiu ne similas al ni. Kaj al la ceteraj helpos iliaj... najbaroj ĉe la lernejtablo!

"Mi ne sidos kun li!" Nu jen: vi, plenaĝa kaj saĝa, volis "kiel pli bonos", sed via lernanto estas malobeema kaj obstina – ne volas transsidiĝi al "tiu ulo".

Eble, entute neniu volas sidi kun ĉi tiu infano, aŭ eble, oni timas ricevi problemojn de aliulo, anstataŭ helpon? La lernejtabla najbaro estas la ĉefa helpanto kaj ŝatanto de ĉiuj viaj lernaj heroaĵoj (kaj eĉ ne nur lernaj) – kia li

estas? Antaŭ ĉio li devas kompreni “vian lingvon”, kaj vi – lian; li devas scipovi helpi vin, subteni dum malfacila situacio kaj... ne trofari, se vi iukaŭze malsukcesas. Do: LA EBLECO DE KUNA KREADO, senkondiĉa SUBTENO kaj... "ne piedpremu la FAVORATAN KALON!"

Miaj multjaraj observaĵoj atestas, ke la plej produktivaj kaj daŭraj "najbaraĵoj" estas la rilatoj de **kunaferado** kaj **neplena dualeco** [**Tabelo 1**], kiel stimuliloj de lernado (tute ne **kompletigo**, kiel oni povus atendi). Ili okupas ĉirkaŭ 30 %, kiuj estas ne malgranda parto el 16 variantoj de rilatoj! La restaj rilatoj, kvazaŭ fermentiloj, “vagadas” en la klasejo, ŝanĝiĝas, sed ne longe ekzistas. (Oni devas rimarki en ĉi tiu kazo, ke ekde la 9-a aŭ 10-a klaso, t.e. ekde 14-16-jara aĝo, adoleskuloj pli kaj pli pensadas pri sia estonteco, kaj komencas pli serioze trakti lernadon; tiam ili elektas najbaron ĉe lernejtablo ne nur por kuna amuzado kaj ripozo – tiuokaze **dualeco** estus tre trafa, sed ankaŭ por produktiva lernado).

Forgesu dume pri la lernado – antaŭe estas vesperfesteno. Babili, danci kune, fumi kaŝe, simple elkuri en la straton "malvarmiĝi" – hej, "**kunaferuloj**", kie vi estas? Jen novaj duonoj establiĝis. Ĉi tie estas grave, ke via kunparolanto ne stresu viajn “grizajn ĉelojn" per sia naiva babilado; li estas apude, sed "ne premas", ne malhelpas gaji, ĉu vi rekonas la **iluziecon**?

Ni denove analizu la statistikon de la situacio "kiu venas kun mi al vesperfesteno?" – ni ricevos la samajn ciferojn (denove dominas ne **dualoj** – tiuj kutime "fermiĝas" en malvasta rondo, sed dum vesperfesteno oni volas komunikiĝi kun ĉiuj).

Do ni nun rezultkalkulos la statistikon de la temo "mirinda lerneja amikeco..." Finfine dominas la rilatoj de **kompletigo (dualeco)** [**Tabelo 1**]! La duan lokon okupas (jen surprizo!) la rilato de **kvazaŭidenteco**. Jes! Povraj lernantoj havas multajn ankoraŭ nesolvitajn problemojn, pri kiuj ili volonte "plorados" unu al la alia. La trian lokon okupas la rilato de **kontrasto**, aŭ "kontraŭ kiu ni hodiaŭ amikas?"

***

Tamen ni denove rakontu pri niaj eternaj 45 minutoj. Vi estas pedagogo, kaj vi demandis la klason pri la lernata temo. Tuj leviĝis “arbaro” de manoj – vi jam povas aljuĝi poentojn.

"Kiel?" – vi miros – "Sed ja neniu ankoraŭ respondis?" Bonvolu ne maltrankviliĝi – vi mem scias la respondon. Nun via tasko estas – plenumi la atendojn de la lernantoj.



Jen levas manon, iomete balanciĝante sur la seĝo, nia "eterna pensanto". Li indiferentas pri via demando kaj via poento – ne ili, sed vi mem lin interesas. Li volas disputadi pri teknikaj novaĵoj aŭ fundamentoj de la monda strukturo (**Serĉulo**).

Kaj kies jen estas penetranta rigardo? Kies firma mano? (Ne timu, ja vi estas pedagogo, neniu vin ankoraŭ "senkronigis"... Tamen vi dubas!) Ŝi certas pri sia rajto por estrado! Provu diveni, kiun poenton jam pense aljuĝis al si via memstara lernantino. Vi ne divenis... He vi! Nun ektondros tempesto... (**Politikulo**)

Eta observaĵo: en mia klaso unuaj du levitaj manoj konstante apartenas al la **Serĉulo** kaj **Politikulo**.

Jen unu forta mano plu kaj kurbeta rideto de veramanto. Kiel li amasigas faktojn! Ĉiu frazo estas gravega. Bonvolu esti justa kaj certa en viaj argumentoj – oni pritaksos. Tamen via malfirmeco ne estos pardonata (**Militulo**).

"Ĉu vi respondos, aŭ turnados la kapon de unu flanko al la alia?" "Nu, bonvolu aljuĝi noton – ju pli bonan, des pli bone! – mi sekvafoje nepre estos diligenta kaj saĝa! Mi devas respondi? Sed kion vi volas aŭdi?..." (**Psikologulo**).

Brave, pedagogo! Via hipotezo estis vera. Nun demandu la duan demandon. Preparu vin al daŭra kunparolado, poentoj estos poste, eble eĉ ne hodiaŭ, eble la kunparolado plu daŭros dum kelkaj sekvaj lecionoj...

"Junulo, ĉu vi komprenis la esencon de la problemo? Ĉu vi volas klarigi viajn opiniojn al la popolo en ĝia lingvo? Do mi ne malhelpos..." (**Mentorulo**. El miaj observoj: **Mentorulo**, kompreninte la demandon, turnas sin al la klaso kaj komencas respondi al ĉiuj, tamen ne toleras dialogon, nur monologon. Unu okazo el la praktiko: klaso ne komprenis la pedagogon kaj petis Mentorulon ekspliki la temon "en nia propra lingvo").

"Junulino! Kombu vin poste! Ha, vi jam decidis respondi..." (Kia esprimriĉeco! Ŝi tiel strebas al la lumo en la fino de la tunelo de siaj rezonadoj...) "Bonege!" (**Bonvivulo**).

"Jes, certe mi vidas, vi jam longe levis la manon. Certe ni kunparolu, certege kiel du saĝuloj. Kiel du saĝaj inter la egalaj". (Senlaca intelektulo!). Kial skribi per la kreto sur la tabulo estas nemoderne? Ha, vi bezonas komputilon... Kaj ke ĉio sur la ekrano moviĝadu, brilu kaj bruadu? (se vi irus cirkon!) Certe ni faros – do jam estas la dudek-unua jarcento... (**Entreprenulo**).

"Kaj vi kial sulkas la frunton? Kio estas neŝpara?! Vi ne devas ĉi tie instruaĉi aliulojn – por ĉi tiu tasko estas mi! Ha, solvo de ĉi tiu problemo ne donas ŝparan rezulton... Prenu kalkulilon kaj ekkalkulu la praktikan utilecon de sciencaj eltrovoj: ĉu vi konvinkiĝis?" (**Administrulo**. Antaŭ ol li konvinkiĝis pri la laŭceleco de agoj – li faros nenion).
La tria demando... Jam sonoras? Tio devis okazi!

Tamen por la tria demando estos malpli multe da levataj manoj. Preparu vin – nun vi devos diveni la deziron respondi laŭ okuloj (jen estas tempo respondi por introvertuloj).
Do – okuloj... Jen tie, ĉe la tria tablo, ilia posedantino "boradis" vin dum ĉiu leciono. Vi ekrigardu en la okulojn, poste – en la kajero. Skuante! Kiel en apoteko. Ne, la apoteka ordo estas eĉ nekomparebla! Pedagogo – pli atente enlegiĝu pri ĉiu komo, jes – pli rigore! Ja vi volas bonon por ŝi... (**Inspektulo**. El miaj observaĵoj: indas kontroli Inspektulon, ĉar se li komprenas, ke li rajtas ne fari ion – li neniam faros).
Junulo, ĉu vi malbone fartas, ĉu ne satdormis? Mi ne volas vin ofendi, nur maltrankviliĝas pri via sano. Por kio estas la sano, vi diras? Kion vi diris pri matematikistinoj? Vi ne konsentas kun la koncepto de Kovalevskaja? Via estas pli proksima al la Vero? Ekspliku ĝin al ni. Ĉu kvin paperfolioj sufiĉos al vi? Ne? (**Justigulo**).
Kaj vi? Volas silentadi, kiel kutime?! Ne volas paroli? Pedagogo, trankviliĝu. Lia rideto estas tute ne malsaĝa. Neniu opinias vin nekompetenta. Kial entute estas viaj demandoj, kies respondoj estas de longe konataj... Tutegale post iuj kvin bilionoj da jaroj la Suno elĉerpos sian rezervon da energio, kaj tiam ni ĉiuj estiĝos... Sufiĉe! Sekva demando! (**Kritikulo**).

Kial vi bezonas ĝin, pedagogo? Kiam finiĝos la "mirindaj lernejaj jaroj", vin adoranta lernantino tutegale rememoros siajn unuan kaj lastan sonorilojn, kiel vi unuafoje enpaŝis en la klason, ekrigardis al ŝi, kuraĝigis, pritaksis ŝiajn meritojn kaj demonstris vian pritakson... Ŝi tiel volas esti amata de ĉiuj, sed vi – demandas... (**Perulo**).

Ĉu vi iam vidis enciklopedion, mankopiitan dum nur unu nokto? Ĉu paĝeto sur aparta paperfolieto, ĉiu paperfolieto en aparta poŝo de la jaketo, kaj kia jaketo!... Pedagogo, pri kio vi pensas – ŝi estas nur via lernantino, sed ne... Nun imagu, ke ŝi memoras almenaŭ la centonon... Brave, marĉandado ĉi tie ne taŭgas! (Aliokaze ŝi sekvafoje mankopios tion, kio apenaŭ plaĉos al vi.)



(**Gardulo**. El miaj observaĵoj: ili ne mezuras siajn bonfarojn, dume ili bonsentas pri iu ajn ulo; kiam ili malbonsentas – ĉio okazas tute kontraŭe. Oni devas pritaksi ilin.)
"Vi volas respondi? Jam skribis ĉion en via kajero? Eĉ la ĉefpenson substrekis per ruĝa krajono, kaj aliajn pensojn per verda? Kaj eĉ markis erarojn en la kajero de via najbaro per ruĝa krajono? Kaj kiu respondos – la najbaro? Respondu, najbaro!" (**Majstrulo**. El miaj observoj: Majstrulinoj ĉiam havas tre belajn, artece dekoratajn aspektojn. Junulinoj kutimas observi la najbaron, precipe se tiu estas de la mala sekso. Iufoje mi intence translokis nesukcesulon al junulino-**Majstrulino**, kaj tio donis efikajn rezultojn).

"Kio? Bonvolu paroli pli laŭte!" Pedagogo! Ne ronĝu vin vane. Tutegale lia dirado estas malnova kiel la mondo mem. Li dediĉis al ĝi ĉiun antaŭan vesperon, skribis, meditis, rezonis... Kaj li, certege, jam pardonis vin pro via malsaĝa demando, kaj pro via malatento al liaj diroj kaj profundaj pensoj, kiuj kaŝiĝas en li, pro via malafabla ekkrio "Pli laŭte!"... Kaj eĉ la poento, kiun vi aljuĝos al li, kaj ĉio, kion vi ne faris, sed nepre faros al li... Kaj la sonorilo, kiu interrompis liajn vortojn... (**Konfesprenulo**).
Ja kvardek kvin minutoj finiĝis, mondaj problemoj estas solvitaj, ĉiuj ŝajnas kontentaj. Antaŭe estas la longe atendita aero de la strato.
Tamen iu ĉe la kvara lernejtablo sub la fenestro simple estadis "sur la strato" la tutan lecionon. Ha, pedagogo! Vi ne rimarkis... Do vi nun neniam ekscios, kiel odoras pluveroj, kiel paseroj salutas Sunon, kiel vagadantaj hundetoj atendas en la strato siajn amikojn-lernantojn... Sed bonvolu ne ĉagreniĝi: jen pasos dek-dekkvin jaroj, kaj grajnoj de via saĝo naskos en lia animo admirindajn ĝermojn... (**Lirikulo**).

**Literaturo:**


1. Gulenko V. Stimuloj kaj filozofioj de la 16 tipoj // IPR, 2003, No. 1.
2. Lytov D. Socioniko – talentoj kaj rilatoj // IPR, 2002, No. 3.





**Interreto:** *http://socioniko.narod.ru*
Aŭtorino: **Tatjana Menŝova** (*surfote*) – lerneja pedagogino. Konsultadas pri socioniko ekde 1999. Krom ĉi tiu artikolo, verkis kelkajn spritajn virinajn socionikajn priskribojn.
Sociotipo: ***Lirikulo*** (*intuiciema-etikiva introvertulo*)

**Tabelo 1. Intertipaj rilatoj:**

| Mi (linioj), partnero (kolonoj) | Serĉulo | Perulo | Bonvivulo | Justigulo | Mentorulo | Inspektulo | Militulo | Lirikulo | Entreprenulo | Gardulo | Politikulo | Kritikulo | Administrulo | Konfesprenulo | Psikologulo | Majstrulo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Serĉulo | ***I*** | ***D*** | ***A*** | ***Sp*** | M+ | R+ | Ka | Iz | Ki | Kf | Se | Es | m | r | Sm | Nd |
| Perulo | ***D*** | ***I*** | ***Sp*** | ***A*** | R+ | M+ | Iz | Ka | Kf | Ki | Es | Se | r | m | Nd | Sm |
| Bonvivulo | ***A*** | ***Sp*** | ***I*** | ***D*** | Sm | Nd | m | r | Se | Es | Ki | Kf | Ka | Iz | M+ | R+ |
| Justigulo | ***Sp*** | ***A*** | ***D*** | ***I*** | Nd | Sm | r | m | Es | Se | Kf | Ki | Iz | Ka | R+ | M+ |
| Mentorulo | m | r | Sm | Nd | ***I*** | ***D*** | ***A*** | ***Sp*** | Ka | Iz | M+ | R+ | Se | Es | Ki | Kf |
| Inspektulo | r | m | Nd | Sm | ***D*** | ***I*** | ***Sp*** | ***A*** | Iz | Ka | R+ | M+ | Es | Se | Kf | Ki |
| Militulo | Ka | Iz | M+ | R+ | ***A*** | ***Sp*** | ***I*** | ***D*** | m | r | Sm | Nd | Ki | Kf | Se | Es |
| Lirikulo | Iz | Ka | R+ | M+ | ***Sp*** | ***A*** | ***D*** | ***I*** | r | m | Nd | Sm | Kf | Ki | Es | Se |
| Entreprenulo | Ki | Kf | Se | Es | Ka | Iz | M+ | R+ | ***I*** | ***D*** | ***A*** | ***Sp*** | Sm | Nd | m | r |
| Gardulo | Kf | Ki | Es | Se | Iz | Ka | R+ | M+ | ***D*** | ***I*** | ***Sp*** | ***A*** | Nd | Sm | r | m |
| Politikulo | Se | Es | Ki | Kf | m | r | Sm | Nd | ***A*** | ***Sp*** | ***I*** | ***D*** | M+ | R+ | Ka | Iz |
| Kritikulo | Es | Se | Kf | Ki | r | m | Nd | Sm | ***Sp*** | ***A*** | ***D*** | ***I*** | R+ | M+ | Iz | Ka |
| Administrulo | M+ | R+ | Ka | Iz | Se | Es | Ki | Kf | Sm | Nd | m | r | ***I*** | ***D*** | ***A*** | ***Sp*** |
| Konfesprenulo | R+ | M+ | Iz | Ka | Es | Se | Kf | Ki | Nd | Sm | r | m | ***D*** | ***I*** | ***Sp*** | ***A*** |
| Psikologulo | Sm | Nd | m | r | Ki | Kf | Se | Es | M+ | R+ | Ka | Iz | ***A*** | ***Sp*** | ***I*** | ***D*** |
| Majstrulo | Nd | Sm | r | m | Kf | Ki | Es | Se | R+ | M+ | Iz | Ka | ***Sp*** | ***A*** | ***D*** | ***I*** |

**Kvadraĵo**: D – dualeco (reciproka kompletigo), A – aktivigo, I – identeco, Sp – speguleco.
**Oktavaĵo**: Es – estingeco (kontrasto), Ki – kvazaŭidenteco, Se – superego, Kf – konflikto.
**Nesimetriaj rilatoj**: M+ – mendo: mi estas mendanta, m – mendo: mi estas mendata, R+ - revizio: mi estas revizianta, r – revizio: mi estas reviziata.
**Najbaraj kvadraĵoj**: Nd – neplena dualeco, Iz – iluzieco, Sm – samspececo, Ka – kunafereco.

***

**La kreskanta redakta teamo de *JUNA AMIKO* laboras intense pretigi la novajn rubrikojn kaj artikolojn, kiuj aperos en aprilo, en la unua 52-paĝa numero de la revuo. Ne maltrafu vian ekzempleron. Vidu la novan amikon. Turnu vin al via landa peranto nun! Vidu la liston tra la ILEI-hejmpaĝo!**



## Félix García Blázquez

# Galimatiaj reguloj

En lernolibroj kaj gramatikoj por la instruado de Esperanto, iom ofte aperas "reguloj" per kiuj oni pretendas klarigi la lingvouzon de la klasikaj verkistoj uzante neadekvatajn argumentojn, kaj bedaŭrinde per lingvaĵo nekohera kaj foje plena je kontraŭdiroj.

Tipa ekzemplo estas la klopodo ekspliki la uzon de la adverbaj finaĵoj en iaj predikativoj: „Kiam la subjekto estas infinitivo, aŭ propozicio aŭ tute ne ekzistas, la adjektiva predikativo alprenas la adverban-neŭtran finaĵon -e"(1)

En la ĉi supra aserto eblas renkonti almenaŭ kvin kritikindaĵojn.

1) Ne ĉiam la infinitivo povas funkcii kiel subjekto, precipe se ĝin akompanas komplemento. En citita ekzemplo de apliko de la "regulo" "*resti kun leono estas danĝere*"
La subjekto ne estas "*resti*", sed "*resti kun leono*".

2) "Adjektiva predikativo" estas duonkaŝita maniero por esprimi la ideon de "adjektivo en predikativo", per kio laŭ la cetero de la aserto, tiu uzo de la adverba finaĵo konstituas klaran malobeon al du reguloj de la fundamenta gramatiko, nome al la 3-a kaj 7-a.
Se tiu uzmaniero estus deviga, ĝi estus grava malperfektaĵo de la lingvo.

3) Se oni parolas pri predikativo, tio nepre signifas ke la ĉefa verbo estas kopula, kaj inter la kopulaj, ni ĉiuj scias ke oni trovas la verbon "*ŝajni*", sed ho!, kun ĉi tiu verbo la supozata regulo ne estas aplikebla . Ekz: "*Ŝajnas evidenta ke la itismaj formoj regas en la aktuala lingvouzo*" (2)
Tio estas escepto kiu kontraŭas la regulan esencon de E-o.

Kompreneble la kritiko ne emas kontraŭi ĉi lastan lingvouzon, sed nur montri la nekoherecon de la argumentado.

4) En la sama verko oni citas ekzemplojn de Zamenhof mem, en kiuj, se la adjektivo troviĝas post adverbo, ĝi konservas la finaĵon "-a" Ekz.: "*estus tre utila tute precizigi la rolon de la Oficejo*". Tio estas kontraŭdiro kun la supozata regulo.

5) Alia komplementa "regulo" tekstas: "Kompreneble, la adverba formo povas esti anstataŭigata ankaŭ per substantivo".

La komprenebleco brilas pro sia foresto. Plie, tiu komplementa regulo estus superflua., ĉar la ĉefa regulo temas pri adjektiva predikativo kaj ĉi kaze temas pri substantiva predikativo.

Vere, post ekzameni tiujn galimatiojn, oni povas konkludi, ke la aserto de la prezidanto de UEA nome: "Niaj propraj lingvistoj verkas librojn por demonstri ke Esperanto estas tiel malfacile lernebla kiel aliaj lingvoj", estas tute prava.

*Félix García Blázquez,*
*<felixgarciablazquez@hotmail.com>*


**Bibliografiaj notoj**

1. Waringhien kaj Kalocsay. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.* Rotterdam 1980 (p.232)
2. *Aktoj de la Akademio.* 1963-1967 (p. 42)

***

## Agrabla enkondukilo (recenzo)

*Esperanto Pro Děti / Esperanto por Infanoj, Jana Melichárová, Kava-Pech, Dobřichovice, 2003, 15 cm. 80 p. Ilus. Miroslava Tomečková. ISBN-80-85853-64-7.*



Jen lernolibro unuavice por ĉeĥaj infanoj, sed uzebla internacie. Nigra-blankaj linio-desegnaĵoj ornamas preskaŭ ĉiun paĝ-malfermon, la tuto estas bone enpaĝigita por ke la instruaĵoj ne aperu dense. La materialo estas aranĝita en tridek ĉapitretoj, kun dulingvaj ĉefe gramatik-specaj titoloj, ekzemple: *Kion faras... Kia estas... En la domo, Pentru, Kapo, Korpo* ktp. Do, temas pri tradici-stila aliro – tipe vortlisto kun kelk-linia legaĵo.



Ne-transitivaj verboj aperas en ĉapitroj 4, 5 kaj 8, transitivaj per *havi –on* en 12, *montri –on* kaj *tuŝi –on* en 17, *manĝi –on* en 25, *trinki –on* en 26, *ŝati –on* en 27. Imperativon oni renkontas en 17, kun bonaj fizikaj, praktikaj ekzercoj. Modelan letereton oni vidas en leciono 24. Prononc-indikoj aperas komence, kun ĉeĥaj klarigoj, sed uzante internaciajn vortojn, kiujn la ĉeĥoj alprenis. Fine vi trovos versetojn, fabelajn dialogojn (kiuj uzas vortojn neprezentitaj en la lecionaj paĝoj), konsilojn por instruisto kaj bildojn por eltondi kaj kolorigi.

La tridek ĉapitretoj prezentas ĉ. 340 vortojn, el kiuj 28 estas verboj. Vidu la liston. La plimulto de la tekstoj estas mond-priskribaj kaj temo-centraj, kiel ekzemple sur p.23: "*Avo sidas sur seĝo, Avino staras ĉe la tablo. Hundo kuŝas sur la planko.*" ktp, dum videblas malmultaj frazoj, kiujn lernantoj povos uzi por fakte komuniki unu kun la alia.
Tamen, valora lernileto, ĉefe pro ĝia klara kaj agrabla dismeto de la materialo kaj profesieca aspekto. Vidu pli da informoj pri ĝi ĉe *www.edukado.net.*

**Verb-indekso por la verko**

La cifero indikas la numeron de la ĉapitreto.
*-on* = Prezentita transitive.
*(-on)* = Prezentita absolute.

*demandas (-on) 17*
*donas –on 12*
*dormas 5*
*estas 2*
*faras –on 5*
*havas –on 12*
*iras 8*
*instruas 20*
*kalkulas (-on) 21*
*kantas (-on) 8*
*kreskas 29*
*kuiras (-on)*
*kuŝas 5*
*legas 8*
*lernas 20*
*ludas (-on) 8*
*manĝas –on 25*
*montras –on 17*
*pentras (-on) 8*
*respondas (-on) 17*
*salutas –on 17*
*sidas 5*
*skribas (-on) 24*
*staras 5*
*ŝatas –on 27*
*trinkas –on 27*
*tuŝas –on 17*

*Stefan MacGill (Hungario)*

## Aŭstralio

Laŭ iniciato de s-ino Penny Vos, kreiĝis agadgrupo por enkonduki Esperanton ĉe la neregistara organizaĵo "*Pacŝipo*". La ŝipo vojaĝas ĉirkaŭ la terglobo 2-3 foje jare kun la celo helpi lokajn aktivulojn en la agado porpaca kaj disvastigi sciendaĵojn pri nuntempaj problemoj sociaj, homaj, naturmediaj. Surŝipe konferencoj, prelegoj kaj lingvostudoj pretigas la vojaĝantojn al la havenaj renkontoj. Nia laborgrupo sukcese progresas en la rilatoj kun la respondeculoj de la *Pacŝipo*. Bezonatas agemuloj en la havenoj vizitotaj. Legu pli: *<http://www.kontakto.info/pacshipo.html>*

*Penny Vos, <penivos@yahoo.com>*

## Brazilo

**Nova tempo por agado**

Jen finiĝas kroma jaro kaj, kiel kutime en preskaŭ ĉiuj kulturoj, homoj tra la tuta mondo nun dividas sian atenton inter rezonado pri la okazintaĵoj el la ĵuspasinta tempoperiodo kaj diversaj planoj por tiu alia, kiu eknaskas novajn eblecojn kaj defiojn. Koncerne al aktivaj E-institucioj, plej supozeble, la situacio ne sonas male.

Komence de la jaro 2005 nia sekcio starigas aniĝokampanjon surbaze de la sama modelo, kiu permesis al nia oficejo arigi ducent membrojn dum 2004. Tiu nombro reprezentis eksterordinaran kreskon de nia apogantaro, se oni konsideras, ke la procentevoluo koncerne la antaŭan jaron signifas ĉirkaŭ...1000 %! Jes ja! Kompreneble tiu informo povus aperi eĉ kiel popoltrajteca reklamo antaŭ tiuj, kiuj ne havis la oportunon akompani la proceson deproksime, sed sufiĉas memori, ke averaĝe du dekoj da heroaj kunlaborantoj ankoraŭ estas por multaj el niaj alilandaj gekolegoj - malgraŭ la dimensidiferencoj inter nia kontinenteca nacio kaj iliaj - vere luksa nombro, laŭ nuntempaj statistikoj.

Samprofiteble estis akompani la strebojn de kelkaj el tiuj "pacaj batalantoj", kiuj ne rezignis kontraŭ diversoriginaj problemfontoj kaj sukcesis planti semojn de instruado kaj edukado kadre de siaj komunumoj, ĉefe ekigante klasojn por ĝeneralaj interesatoj. Sed, ankaŭ per alia vere ŝajnfruktodona spaco fosis ero de tiuj samideanoj alternativan vojon: temas pri la akceptigo de liberaj kursoj de Esperanto kadre de universitatoj, kelkaj el ili federaciaj kaj tial tre respektataj en Brazilo. La publiko kiu vizitadas tiajn supernivelajn instituciojn teorie povos kunlabori pli efike cele al opinifirmigo en la socio pri tio, kion ili defendas kaj lernis respekti dum siaj studotempoj.

Ankaŭ problemoj okazis, kompreneble. Politikaj malkonsentoj inter du kandidataroj akre rivalaj inter si preskaŭ malpermesis la okazigon de nia ekzamensesio ĉe la *39-a Brazila Kongreso de Esperanto*, kie balotado por *Brazila Esperanto-Ligo* estis realigata. Tamen, diplomatiaj kaj sekurigaj vortoj de nia prezidanto *Radojica Petroviĉ*, krom la valora apogo de *Renato Corsetti* kaj aliaj eminentuloj, ne nur garantiis la efektivigon de nia iniciato, sed invitis ankaŭ al repacigo kaj reordigo de la tiama bedaŭrinda situacio. Ĉiel ajn, neniel aserteblus, ke la fina bilanco de nia jaro aperus negative. Malfacilaĵojn ĉiuj alfrontu. Ĉu ne estas ĝuste ili, kiuj ironie plifortigas nian volon? La movado enhavas forton sufiĉan por venki tiajn barojn – tion ni povis konstati kaj ĉiutage reasertas per la maniero entuziasma kiel nia konstanta oficejo daŭre ricevas fotojn, raportojn, helpopetojn, demandojn, dubojn, kritikojn kaj sugestojn de nia instruistaro. Al ili kaj al vi, nia atentema leganto, ni kore deziras Mirindan Novjaron!

*Rodrigo de Méo, Sekretario de ILEI-BR*
*<ileibr@linguauniversal.com.br>*





*Surfote: Zamenhof-festo 2004 en Brazilo*

# Germanio

**Kurso kaj planoj en Germanio**

Kvin-sesia kurso pri instruado altiris bonan nombron da partoprenintoj dum la tradicia 7-taga jarŝanĝa *Internacia Festivalo* (IF) en *Magdeburg*. Ĝin gvidis *Stefan MacGill* laŭ la lernilo *Tendaraj tagoj II*. La dua kursa sesio estis planita kiel prelego malferma al ne-kursanoj, sed intereso pri la instruado de gramatiko tiom grandis, ke ĝi fariĝis diskut-rondo pli ol prelego (kaj disput-rondeto koridore poste). Kursanoj teoriumis komence kaj praktikis fine, problem-solve kaj rol-lude (finrezulto por 2004: Volapukistoj 2, Esperantistoj 2).



*Stefan MacGill antaŭ la Interkultura Centro Herzberg (ICH)*


Planoj koviĝis okazigi pedagogian aranĝon (1-3 okt. 2005) komune inter *ILEI* kaj la *Esperanto-Centro en Herzberg* (Koromonto). Detalojn vi legos en la sekva *IPR*. Prepare al tio, la du partioj, kune kun aliaj interesatoj (*GEA, GEI*, la *ILEI-sekcio*) kompilos liston de instru-/eduk-/-istoj/-antoj en Germanio kaj dissendos al ili enketilon, por malkovri kiel fortigi la kontakton kun kaj inter ili kaj pli bone servi al tiuj nemalmultaj homoj.
Pliaj informoj: *www.ic-herzberg.de, www.Esperanto-Zentrum.de* kaj *<esperanto-zentrum@web.de>*. *(smg)*



# Hungario

**Disertacio pri la instruado de la planita lingvo Esperanto**

La 11-an de novembro 2004 *s-ro Iván Bujdosó* sukcese defendis sian doktorigan disertacion pri „Instruado de la planita lingvo E-o" ĉe la katedro pri (ĝenerala kaj) aplikata lingvistiko, de la *Budapeŝta Universitato L. Eötvös* (populare: *ELTE*), akirante tiel sciencan gradon de universitata doktoro (PhD). Gratulojn al li!
Jen mallonga resumo de la disertaĵo: „Esperanto estas planita lingvo. Oni difinas ĝin kiel hindeŭropan mini-muman lingvan modelon. La disertaĵo precizigas tiun difinon je: lingva modelo kun mezeŭropa substrato kaj novlatina leksiko. E-o estas ekzemplo, ke oni povas krei planitan lingvon kaj ĝi taŭgas por la celoj. La disertaĵo argumentas, ke E-o funkcias kiel vivanta lingvo. (Se oni akceptas scienca kategorio la metaforon: vivanta lingvo). Se ni serĉas la rimedojn por solvi la problemon pri la lingvaj problemoj en la mondo, ankaŭ E-o havas lokon apud la aliaj alternativoj: mondangla, lingvo-perantoj, plurlingveco kaj maŝina tradukado.



*Vlad'ka Chvátalová, Aida Čižikaitė kaj Iván Bujdosó dum la 37-a Konf.*

La vivrajtecon de planita lingvo donas ĝia facila lernebleco. Tion pruvi la disertaĵo prezentas unu teorian modelon kaj du praktikajn ekzemplojn.
Indas prezenti la historion de la lingvoinstruado kaj ene de ĝi tiun de la instruado de E-o, ĉar inter la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj la teknika evoluo iujn metodojn povas revivigi. La disertaĵo prezentas la tradiciajn metodojn en la instruado de E-o kaj iliajn variantojn kun nuntempa tekniko.


Se ni rigardas la historion de E-instruado, estas videbla la kontraŭdiro inter la sukcesa, tamen instinkta instrua praktiko, la ĝin konfirmanta teorio kaj la ne tiom sukcesa praktiko produkti instrumaterialojn (lernolibron, interretan materialon) respektive.
Tiu ĉi kontraŭdiro maturiĝis por esti esplorata kaj anstataŭigita per nova instrua strategio. La disertaĵo argumentas, ke E-o estu instruata en du partoj. La unua parto estu laŭ rekta metodo, la akiritan lingvoscion oni povas enprofundigi per lingvoekzercado en iu reala situacio. En la dua parto estu dominanta la gramatika-kontrastiva analizo mobilizanta ankaŭ la gepatralingvajn konojn. El tiu ĉi vidpunkto la disertaĵo trarigardas la sciencajn verkojn pri la metodiko de Esperanto kaj ĝi donas emfazon al la detaloj kiuj traktas la rolon de la gepatra lingvo.
La esploro per statistikaj rimedoj pri la lingvoekzamenoj subtenas la komencan hipotezon, nome, ke la gepatralingva konscienco havas decidan rolon en la sukceso. La statistikaj esploroj donas kelkajn interesajn rezultojn, ekzemple tion, ke la sukceso en la lingvoekzameno estas sendependa de la aĝo super la aĝo 15 jaroj.
La disertaĵo proponas kiel plani la instrumaterialon en la menciitaj du partoj. Unue ĝi determinas la minimuman vortotrezoron en la unua parto laŭ teoriaj prikonsideroj kaj laŭ la esplorado de la lingva materialo prenita el la viva parolado kaj el la literaturaj korpusoj. Oni povas kompletigi tion per la esploro de ofteco de la tabelvortoj kaj laŭ tio oni povas proponi ilian instruadan sinsekvon. En la planado de la dua parto nin helpas la materialo konigita ĉe la aŭtoroj de metodologio. Post la determino de la vortotrezoro estas proponata la tematika-situacia modelo, kun du ekzemploj: unu estas el iu lernolibro, la dua ekzemplo estas prenita el speciala vortaro.
La modernaj komunikaj rimedoj devigas nin rekonsideri niajn imagojn pri la instrua procezo. Sur la tereno de motivigado la teknikaj rimedoj donas grandajn eblecojn.
La modernaj rimedoj tute aliformigas niajn lernokutimojn, ili donas al ni konstantan lernan ĉirkaŭaĵon. Kreskas la ŝanco, ke la lernantoj povos aktive uzi la lingvon kaj ne nur pasive ellerni. La ĉirkaŭaĵo de interreto donas tiun eblon.
La serĉadon de la plej bona instrumetodo motivas la ŝanĝo en la publika opinio en Eŭropo. Certaj signoj montras, ke ni povas akiri la materian bazon por iu bone preparita esploro pri la E-instruado en pluraj landoj. Por bazi metodologion ni bezonas interlandan kunlaboron. Tion servas la listigo de universitatoj, kie E-o estas instruata en kelkaj horoj por kredit-poentoj kaj aliaj universitatoj, kie ĝi estas ne nur instruata, sed pere de ĝi oni povas akiri fakajn sciojn."

*Pliaj detaloj ĉe: http://www.geocities.com/bujdosoivan/bujdosoe.htm*

## Italio

**Kunveno kadre de universitataj lecionoj**

Klasĉambro plenplena je scivolemaj civitanoj kaj universitataj gestudentoj: vere mirige por lingvo - esperanto - pri kiu, plejparte, oni opiniadas, ke ĝi ne ekzistas. Bonega respondo fare de la publiko, do, al la kunveno "*La Holokaŭsto kaj la esperantistoj*", okazinta la 13[an] de decembro en la sidejo de nia urba Universitato en strato D'Azeglio (Fakultato pri Beletro kaj Filozofio, Departemento de klasika kaj mezepoka Filologio) kadre de ciklo de prelegoj pri ĝenerala lingvistiko fare de *prof-ro Davide Astori*.
Ĉiuj prelegintoj (kunordigitaj de *Astori* mem) estis universitataj docentoj: *Renato Corsetti*, psikolingvisto de la Universitato "La Sapienza" de Romo; *Mauro La Torre*, spertulo pri scienco de la komunikado de Roma 3; *Giordano Formizzi*, pedagogo de la Universitato de Verono; *Fabrizio Pennacchietti*, titola prof-ro pri semida filologio de la Universitato de Torino.
Malsamaj temoj: de ĝenerala lingvistiko al socilingvistiko, de la politika lingvistiko de la nova Eŭropo al la turmentita historio de la "mallonga jarcento" en plurvoĉa pliprofundiĝo kiu vidis E-on ne kiel objekton de enketo, sed kiel ilon – inter la variaj ebloj – de analizo de nia nuntempo.
En nia urbo esperanto havas antikvajn radikojn. La parma E-rondo naskiĝis en la jaro 1913[a], kaj dum la jaroj sekvis unu la alian famaj prezidantoj: inter ili la rektoro de la Universitato Giorgio Canuto kiu estris la grupon (hodiaŭ ankoraŭ titolita ĝuste al li) de 1950 ĝis la morto (en 1960), kaj *Guglielmo Capacchi*, profesoro pri la hungara lingvo, tre konata persono en la urbo pro sia multfaceta kultura aktivado.



Oftaj estis dum la jaroj la kontaktoj kun la Universitato, tial ke la 70[a] jubileon de la parma E-rondo (29[a] majo 1983[a]) oni celebris ĝuste en la aŭlo de la Filozofoj de nia Universitato.

Lingvo utiligebla kaj utiligata, karakterizita de gravaj originaj verkoj, esperanto estas temo de studoj kaj universitataj kursoj, eksterlande kaj ankaŭ en Italio: en diversaj landoj precipe en la orienta parto de Eŭropo (paradigmaj estas la kazoj de Budapeŝto kaj Poznano), ekzistas doktorigaj kursoj pri esperantologio; en la Respubliko San-Marino universitato nomita AIS, uzas ĝin kiel vehiklan lingvon; dume en Torino de pluraj jaroj okazas instruado de Interlingvistiko kaj Esperantologio, kiu altiras bonan nombron da gestudentoj kaj ne malmultajn doktorigajn disertaciojn. Io simila, pli limigite, okazas ĉe la Libera Universitato pri Lingvoj kaj Komunikado IULM de Milano kiu ekde multaj jaroj gastigas riĉan sekcion de Esperanto kaj interlingvistiko ene de sia biblioteko (rete konsultebla je TTT-paĝo <www.iulm.it>).

La parolantoj de E-o nombras kelkajn milionojn: laŭ la brita Enciklopedio estas preskaŭ ok milionoj en la tuta mondo.

Celoj? La plej diversaj. De la vojaĝoj al produktado kaj vehikulado de kulturo, al pli simpla plezuro de korespondado. En la Instituto de Cibernetiko de Paderborn (Germanio) faka teamo de pedagogoj pruvis la propedeŭtikan valoron de la Internacia Lingvo en lernado de etnaj lingvoj, cetere plurfoje science pruvita de aliaj fakuloj. Ekzemple *prof-ro Zlato Tisljar*, kadre de AIS, faris sciencan eksperimenton laŭ la metodologio de Paderborn kaj verkis magistran disertacion kies propedeŭtikajn labor-rezultojn li rikoltis en la libro "Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj". Fakte en tiuj eksperimentoj klarvide montriĝis, ke E-o rapidigas la lernadon de naciaj lingvoj je proksimume 30 %.

Pasis 110 jaroj ekde la oficiala naskiĝo de la lingvo, do, la "ludo" daŭradas: estos ĝuste Italio, en 2006, kiu gastigos en Florenco la 91-an tutmondan kongreson.

Tiuj kiuj deziras ekscii kromajn kuriozaĵojn pri E-o, bonvolu viziti la TTT-paĝaron de la Itala Esperanto-Asocio *www.fei.it*, turni sin al la retadreso *<UK2006.informoj@esperanto.it>* aŭ kontakti la E-Asocion "Giorgio Canuto" de Parmo ĉe *<silkovojo@aliceposta.it>*.

*Vittorio Madella*

## Kroatio

**Kurso por blinduloj en Kroatio**

*Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj* (KUNE) funkciigis ekde oktobro porkomencantan kurson. Instruis s-ino Nevenka Imbert.

KUNE preparas por la kursanoj brajlan formon de lecionoj de la lernolibro laŭ la Zagreba Metodo. La samaj lecionoj aperis ankaŭ rete kadre de la retpaĝaro de Kroata Esperanto-Ligo: *www.esperanto.hr*, prizorgata de Davor Klobucar.

*Esperanto-Zagrebo, <esperanto@zg.htnet.hr>*

## Kubo

**Esperanto en moderna universitato**

"Amikoj de Esperanto" estas la nomo de Klubo ĵus kreita en la Universitato pri Informatikaj Sciencoj, kiu troviĝas en Havano. La Klubo celas grupigi ĉiujn studentojn de la Universitato, kun intereso pri E-o, kaj la membroj havos la ŝancon lerni la lingvon, konatiĝi kun la movado kaj kun la lingva situacio en la mondo.

En la Klubo nun membras 85 studentoj, sed ĉiutage okazas pliaj aliĝoj. La funkciado okazas en rekta kunlaboro kun Kuba E-Asocio.

La klubanoj disponas pri modernaj komputilaj rimedoj por utiligi elektronikajn materialojn en la lernado de E-o.

La Universitato pri Informatikaj Sciencoj troviĝas en la municipo *Boyeros*, urbo *Havano*, en la kvartalo *Lourdes*. Ĝi havas modernan teknologion kaj estis fondita ene de la programo „Batalo de Ideoj".

*Vizitu: http://www.esiss.co.cu/esperanto/uci/uci.htm, aŭ kontaktu Norberto Diaz Guevara, <norberto@ssp.desoft.cu>*

## Usono

**Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto**

**NASK** okazos denove ĉe la monde konata interkultura altlernejo, *The School for International Training* (La Altlernejo por Internacia Trejnado) en la nordorienta "nov-anglia" regiono de Usono **inter la 4-a kaj 22-a de julio 2005.**

Kursokotizo: 995 USD.

Loĝado: en dulitaj ĉambroj kun tri manĝoj: 700 USD; unupersona ĉambro 820 USD. (Stipendioj haveblas!)

Kontaktu: *Ellen M. Eddy,11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 Usono, Telefono: 360-754-4563, <eddyellen@aol.com>*

Informiĝu ĉe:

*http://esperanto.org/nask/*

NASK Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto North American Summer Esperanto Institute

***

## Al la ILEI-sekcioj kaj Landaj Asocioj de UEA

Surbaze de la Strategia Laborplano de UEA por la periodo 2001-2010 kaj de la decidoj de la komitato en Gotenburgo kaj Pekino, nia agado por la mandatperiodo 2004-07 starigas laborplanon, kiu alstrebos adaptiĝi al konkretaj bezonoj kaj cirkonstancoj en viaj regionoj kaj landoj.

Kiel celo de nia laborplano, vi ĉiuj estas esencaj partneroj kiuj grave rolas en nia komuna agado por plifortigo kaj tutmondigo de UEA kiel tegmenta asocio de la internacia E-movado.

Post renovigo kaj plifortiĝo de la regionaj komisionoj de UEA ni petas al vi daŭre utiligi la diversajn ilojn je via dispono, nome, renkontiĝoj, diskutlistoj kaj retejoj, i.a. por instigi la lokajn klubojn, landajn aktivulojn kaj ILEI-sekciojn en via regiono al plia kunlaboro en la kampoj de informado, edukado kaj utiligo de E-o.

Kun aparta emfazo ni instigas vin stimuli viajn landajn asociojn kaj edukajn instancojn daŭrigi aŭ iniciati (kie ne ekzistas) kunlaboron kun ILEI, kaj inter si, por plenumo de sia instrua agado kaj ekzameni la problemon de la instrurajtigaj diplomoj kaj de la kongruigo inter la internaciaj ILEI-diplomoj, la specifaj landaj diplomoj kaj ties adapteblo al la naciaj sistemoj, kio estis aparta rekomendo de la UEA-komitato en Pekino.

Mi tre esperas ke ni sukcesu iom post iom avanci en tiu ĉi celo kaj tre optimisme atendos viajn koncernajn raportojn, sendepende ĉu estas abundaj aŭ malabundaj. Por nia komuna laboro mi multe kalkulas je via agado pro tio ke de vi multe dependas la forto kaj efiko de UEA, kies pilieroj vi ja estas.

*Maritza Gutiérrez González,*
*estrarano pri landa kaj regiona agado,*
*<mgglez@enet.cu>*

## Laurynas Algimantas SKŪPAS
**(1937.08.10 – 2005.01.10)**



La 10-an de januaro post longa kaj grava malsano en Vilnius forpasis konata litova esperantisto **Laurynas Algimantas Skūpas.** Li naskiĝis la 10an de aŭgusto 1937 en distrikto Kupiškis, studis la francan lingvon en Vilnius Pedagogia Universitato kaj Moskva Instituto pri Fremdaj Lingvoj. L.A.Skūpas estis vera poligloto — krom la litovan kaj Esperanton li parolis ruse, pole, hispane, germane, france, itale, provance, turke. Ekde 1964 li laboris en Vilnius Universitato kiel profesoro de la franca lingvo, en la jaroj 1970-1980 estris katedron de la franca lingvo, staĝis en Parizo, Bruselo, Moskvo.

En 1992-1995 li instruis la litovan lingvon en Pariza Instituto pri Orientaj Lingvoj, verkis lernolibron de la litova lingvo por franclingvanoj.
L.A.Skūpas esperantiĝis en 1959 kaj iĝis longjara kaj aktiva aganto por E-o en Litovio. Prof. dr-o L.A Skūpas gvidis multajn E-kursojn, en Vilnius universitato prelegis pri E-o kaj interlingvistiko-esperantologio. Li estis gvidanto de diplomverkoj pri E-temoj de Laimius Stražnickas, Rolandas Stramkauskas, Aida Čižikaitė. Multaj liaj artikoloj aperis en "Horizonto de Soveta Litovio", "Litovio hodiaŭ", "Litova stelo" k.a. periodaĵoj. Dum la jaro 1989 li preparadis, redaktis kaj legis Esperantajn radioelsendojn en Litova Radio. En 1987-1989 li aktive laboris en MEM (Mondpaca E-ista Movado). Okaze de 100-jariĝo de E-o en 1987 li verkis kaj eldonis popularan libreton pri E-o en la litova lingvo *Esperanto tarptautinė kalba* (Internacia lingvo E-o), partoprenis en multaj UK-oj, BET-oj kaj en aliaj internaciaj E-aranĝoj. Li estis estrarano de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), prezidanto de Litovia filio de ASE (1979-1988), prezidanto de Litova E-Asocio (1988-1993). Pasintjare aperis lia nova lernolibro de Esperanto por litovoj[3]. Li ĵus fintradukis libron de John Wells *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, kiu baldaŭ aperos en la litova lingvo. Li recenzis multajn interlingvistikajn kaj esperantologiajn librojn aperintajn en Litovio, estas aŭtoro de ĉ. 40 sciencaj artikoloj pri interlingvistiko, provencalistiko kaj fonologio, prelegis france kaj Esperante pri Litovio kaj ĝia kulturo en Belgio, Pollando, Israelo, Ĉeĥio, Hungario, Francio, Nederlando, Japanio.
Dum la lastaj jaroj L.A.Skūpas aktive laboris en Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, estis estrarano de IKUE, kandidato al Akademio de E-o. Pasintjare li gvidis OK de 57a kongreso de IKUE en Kretinga. Li entuziasme partoprenis ankaŭ en la preparado de la 90a UK, kies LKK-ano li estis, sed la senkompata sorto forprenis lin de ni tro frue. Litova esperantistaro akre sentos la forpason de la sindona kaj aktiva samideano.

*Laŭ la nekrologo, aperonta en la revuo Litova Stelo*

[3] NdlR: En la jaro 2004 Eldona Instituto pri Sciencaj kaj Enciklopediaj Libroj en Vilnius eldonis la lernolibron *Esperanto kalbos vadovėlis de* L.A.Skūpas.
La eldonaĵo estas la plej kompleta kaj bone strukturita lernolibro, kiun oni havas en la pli kaj pli riĉiĝinta litova merkato de E-libroj. Kvankam ĝi verkiĝis por litovlingvanoj, alinaciaj instruistoj povas ĉerpi el la libro multajn ideojn por sukcese kaj interese instrui la internacian lingvon. Detala prezento pri la lernilo troveblas en la Katalogo de www.edukado.net. Valorus konsulti la libron dum UK en Vilno!



# 38-a Konferenco de ILEI 2005 en Kaunas, Litovio
## 30 julio-05 aŭgusto 2005

**Pri la konferenca urbo Kaunas**

Ĉe la kunfluo de Nemunas kaj Neris situas Kaunas, la dua urbo de Litovio, konata kultura centro de la lando. Oni rajte nomas Kaunas 'urbo de studentoj'. En ĝiaj universitatoj studas pli ol 50.000 studentoj. Konataj estas la urbaj teatroj, muzeoj, aliaj kulturaj institucioj. En la urbo estas gardata la heredaĵo de la genia litova artisto Mikalojus Konstantinas Čiurlionis.




La „vizaĝon" de la urbo formis ĝia natura ĉirkaŭaĵo. La urbon ornamas centjaraj tilioj kaj kaŝtanoj, kaj multaj floroj. El ĉiuj flankoj la urbo estas ĉirkaŭata de bonodorantaj pinarboj, montoj kaj montetoj, arĝentaj strioj de riveretoj. La belecon de Kaunas prikantis la fama poeto Adam Mickiewicz, la najtingalo dela litova popolo Salomėja Nėris kaj aliaj poetoj.
Kaunas estas unika urbo ankaŭ pro la naŭ fortikaĵoj, el kiuj kelkaj estas viziteblaj.

Ĉe Kaunas estas gravaj vojkruciĝoj. Veni al urbo oni povas tra aŭtovojoj, fervojoj, riveroj kaj per aviadiloj. Al la flughaveno situanta en Karmėlava venas aviadiloj el multaj Eŭropaj urboj. Per trajno la urbo estas atingebla de Ruslando, Estonio, Latvio, Belorusio kaj Pollando. Per busoj de la kompanio „Kautra" la urbon oni povas atingi el pli ol 40 urboj de Eŭropo. Litovoj ĝis hodiaŭ nomas Kaunas "La Provizora ĉefurbo", malgraŭ, ke post tiu tempo, kiam ĝi estis la plej grava urbo de la ŝtato, jam pasis pli ol duonjarcento. Venu Vi mem, kaj decidu, ĉu kaunasanoj havas pri kio fieri. BONVENON!

**La vetero en Kaunas**

Fine de julio kaj komence de aŭgusto en Litovio estas kutime varme (+20-25 C). Kelkfoje pluvas. Sed, oni devas ne forgesi, ke la proksimiĝanta aŭtuno jam estas sentebla kaj la vesperoj estas sufiĉe malvarmaj. Do, ne forgesu kunporti puloveron kaj palton (precipe, se vi intencas viziti la marbordon).



*Surfote: panoramo de Pažaislis, vd.DT1*

**Elektra kurento**

La elektra tensio estas 220-volta. La kontaktingoj estas dupolusaj kaj taŭgaj foje por platformaj foje (pli ofte) por rondformaj kontaktiloj. Konsilindas havi adaptilon por uzi viajn alportitajn aparatojn.

**Alveno al Kaunas**

Dezirantoj partopreni la 38-an ILEI-Konferencon povos vojaĝi de la sidejo de UK en Vilnius (Reval Hotel Lietuva, Konstitucijos pr. 20) per buso al la sidejo de la ILEI-Konferenco. La buso forvojaĝos je 15:00 horo kaj post ĉirkaŭ 2 horoj ĝi alvenos en la malnovan urbon de Kaunas, kie situas la tranoktejoj por la konferencanoj.
*Prezo de la vojaĝo: EUR 10,00.*

**Manĝoj**


En la ĉirkaŭaĵo de la konferencejo kaj de la tranoktejoj estas pluraj diverstipaj kaj diversprezaj restoracioj, kafejoj kaj startrinkejoj kie eblas manĝi ankaŭ vegetare.



**Konferencejo kaj hotelo**

La Konferenco okazos en la *Universitato Vitautas la Granda*. La adreso estas *S. Daukanto 28, Kaunas*. Ĝi situas en la urbocentro, ĉirkaŭ 20 minutojn piede de la tranoktejoj el la malnova urbo kaj same de la studenta komunloĝejo.

Por tranokti estas la jenaj eblecoj:



- *Hotelo "Minotel"* situanta en la malnova urbo (str. V. Kuzmos 8, *vd. foton dekstre!*) je 20-minuta piedira distanco de la konferencejo, proksime al la episkopeja junulargastejo, en trankvila, piedira parto de la urbo. Ĝi estas malgranda, kvieta kaj simpatia, bone ekipita, ĝi havas ĉambrojn de luksa klaso kaj de simpla turisma klaso.
(La matenmanĝo estas inkluzivita. )
*Prezo: 1-lita ĉambro EUR 50,00; loko en 2-lita ĉambro: EUR 40,00.*


- *Katolika Junulargastejo*: ĝi situas en la malnova urbo (str. M. Daukšos 21) je 20-minuta piedira distanco de la konferencejo. Tie ni havas je nia dispono ĉambrojn por ĉirkaŭ 30 personoj kaj en alia konstruaĵo, apartenanta al la sama organizo, pliajn 48 dormlokojn. La ĉambroj estas 2-litaj, 3-litaj kaj 4-litaj. En la unua ejo la necesejo kaj duŝejo estas en la koridoro, en la dua ejo ili estas en la ĉambroj.
Prezoj: *loko en 3-lita ĉambro EUR 11,00; loko en 2-lita ĉambro EUR 13,00; loko en 1-lita ĉambro EUR 17,00.*
(La prezoj estas por 1 persono por 1 nokto. La matenmanĝo ne estas inkluzivita.)

- *Studenta Komunloĝejo*: ĝi situas aliflanke de la urbocentro, sed same je 20-minuta piedira distanco de la konferencejo. Je nia dispono tie estas 2-litaj kaj 3-litaj ĉambroj. Necesejoj kaj duŝejoj estas en la ĉambroj.
Prezo: *loko en ĉambro (ĉu 2-lita, ĉu 3-lita) EUR 7,00 por 1 persono por 1 nokto.* (La matenmanĝo ne estas inkluzivita.)

**Bv. neniam skribi al la konferencejo, sed nur al la estrarano pri konferencoj!**

__*Tuttagaj ekskursoj*__ (ambaŭ ekskursoj okazos mardon, la 2-an de aŭgusto)

***TT1: Ekskurso al la nacia parko de Aukštaitija.*** Survoje ni vizitos la Etnokosmologian muzeon, ununuran en Eŭropo. Dum la ekskurso ni vidos la pitoreskan pejzaĝon de Aukštaitija, kun malgrandaj montetoj. En la teritorio de la parko troviĝas ĉirkaŭ 1000 lagoj (entute en Litovio estas pli ol 3000 lagoj). Ni haltos en la turisma centro de Palūšė, kiu, laŭ la programo de la Eŭropa pli-larĝiĝo, post kelkaj jaroj iĝos eŭropnivela banloko. Ni vizitos la akvomuelejon de Gilučiai, grimpos al Ladakalinis (glacia monto) de sur kiu videblas 7 lagoj. Ni tagmanĝos en la kafejo de Eŭropa kultura heredaĵo. *Prezo de la ekskurso: EUR 40,00*



***TT2: Ekskurso al la parko Grūtas.*** Dum la ekskurso ni vizitos parkon de skulptaĵoj, en kiu troviĝas sovettempaj monumentoj – renversitaj idoloj. Ĉi tie oni povas vidi Lenin, Dzerĵinskij, la iamajn kvar litovajn komunarojn kaj multajn aliajn komunistojn. Survoje ni vizitos Druskininkai [*vd. foton supre!*], la faman banlokon ĉe rivero Nemunas. Ni veturos per ŝipo al Liškiava, kie ni ĝuos la pitoreskan pejzaĝon de la valo de Nemunas. Ni vizitos la preĝejon en Liškiava, kiu estas unu el la plej belaj barokaj monumentoj en Litovio. La tagmanĝo estas inkluzivita. *Prezo de la ekskurso: EUR 45,00*



__*Duontagaj ekskursoj*__

***DT1: Ekskurso al la monaĥinejo de Pažaislis.*** La monaĥinejo de Pažaislis estas unu de la plej belaj barokaj konstruaĵoj en Litovio [*vd. la foton dekstre*!], situanta apud Kaunas maro (artefarita lago). Ĉi tiu ekskurso okazos dimanĉon, la 31-an de julio. *Prezo de la ekskurso: EUR 15,00.*





***DT2: Ekskurso tra la urbocentro kaj muzeo de Čiurlionis.*** Piedira ekskurso tra la urbocentro de Kaunas kaj vizito de la muzeo de la mond-fama litova pentristo kaj komponisto Mikalojus Konstantinas Čiurlionis. Ni veturos supren al Žaliakalnis (Verda monto) per funikularo, grimpos al la turo de la preĝejo de Resurekto kaj rigardos la panoramon de la urbo. Ĉi tiu ekskurso okazos merkredon, la 2-an de aŭgusto.
*Prezo de la ekskurso: EUR 13,00*

***DT3: Ekskurso tra la malnova urbo.*** Perpieda ekskurso tra la malnova urbo, kie abundas interesaj preĝejoj kaj aliaj arkitekturaj monumentoj, troviĝas urbodomo, kunfluas du ĉefaj riveroj de Litovio Nemunas kaj Neris. Dum la ekskurso ni vizitos la tombon de prelato Aleksandras Dambrauskas (li estis unu el la pioniroj de E-o), la sidejon de Litova E-Asocio en strato Zamenhofo (la domo, en kiu naskiĝis Klara Zilbernik, la edzino de L. Zamenhof). Ĉi tiu ekskurso okazos lundon, la 1-an de aŭgusto.
*Prezo de la ekskurso: EUR 10,00*



***DT4: Ekskurso al la muzeo de popola vivmaniero en Rumšiškės.*** La subĉiela muzeo troviĝas ĉe la Kaunasa maro. En ĝi ni vidos malnovajn domojn el diversaj regionoj de Litovio, kutiman centron de mezepoka urbeto, en kiu funkcias diversaj metiejoj kaj donacvendejoj.
Tagmanĝo en loka manĝejo. Ĉi tiu ekskurso okazos jaŭdon, la 4-an de aŭgusto.
*Prezo de la ekskurso: EUR 25,00*



**Difinoj**
***Membro de ILEI***: tiu kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco.
***Junulo***: tiu, kiu naskiĝis post 1-a de januaro 1975 inkluzive.

**La kotizo ne estas repagebla**, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Konferencon pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Konferenco ne okazas aŭ okazas en alia urbo.


**La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj eventuale aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj kaj mendiloj aperis en IPR. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.**

**Konferencaneco ne estas transdonebla al alia persono.**

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago ĉe la ILEI-Kasisto. Aliĝilo sen kompleta pago ne estas traktata.

**Kaze de malaliĝo plej malfrue unu monaton antaŭ la kongreso, la aliĝinto ricevos sian pagon krom la kotizo kaj 10 % por la kovro de la organizaj kostoj, malaliĝante ĝis 14 tagoj antaŭ la kongreso estos redonata 60 % de la pagoj krom la kotizo, ĝis 1 tago antaŭ la kongreso 40 %, malaliĝante dum la 1-a tago (kaj pli poste) de la kongreso la aliĝinto ricevos neniom.**

**Konferenca Regularo** (*ekstrakto*):
6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco.
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro."



*(Preĝejo en Palūšė)*



## 38-a ILEI-Konferenco
## 30 julio-05 aŭgusto 2005
## Kaunas, Litovio

Konferenca Numero:

*"Interkultura komunikado en edukado"*

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon, fotokopion aŭ samformatan paperon. Bv tajpi aŭ skribi preslitere per latinaj literoj. Plenigitan aliĝilon bv sendi al *Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*

FAMILIA NOMO .................................................... VIRO/VIRINO
(por alfabeta ordigo) (forstreku unu)
PERSONA(J) NOMO(J) ....................................................
ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo) ....................................
..........................................................................................
LANDO .......................................TEL Nº (kun prefikso) ........................
FAKSO.........................................RETADRESO ......................................
PROFESIO/FAKO ....................................................................

Mi aliĝas al la Konferenco laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko kaj pagas

☐al la UEA-konto ilek-a (nur se vi pagas antaŭ la 15-a de majo 2005)
☐al la ILEI-Kasisto

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn en ĉi tiu aliĝilo.

DATO ....................................... SUBSKRIBO ......................................

| | |
|---|---|
| ALIĜKOTIZO (vidu dorse) | ........................ |
| ...... tranoktoj | ........................ |
| en hotelo en ...-lita ĉambro | ........................* |
| en katolika junulargastejo en ...-lita ĉambro | ........................* |
| en studenta komuna loĝejo en ...-lita ĉambro | ........................* |
| Ekskursoj | ........................** |
| Transporto Vilnius/Kaunas | ........................ |
| Fonduso "Dazzini" | ........................ |
| Koleghelpa Fonduso | ........................ |
| Fonduso "Erika Linz" | ........................ |
| Fonduso "Interkulturo" | ........................ |
| Fonduso Szerdahelyi | ........................ |
| DONACO | ........................ |
| BANKKOSTOJ | ........................ |
| ENTUTE (en eŭroj) | ........................ |

* Mi mendas tranokton ekde la ................ ĝis la ................................ en .....-lita ĉambro
* Se vi mendas dulitan/trilitan ĉambron, bv indiki, kun kiu vi dividas la ĉambron .................
.......................................................................................................
** Bv indiki ĉi tie kiu(j)n ekkurso(j)n vi mendas.......................................................
Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu ILEI jam havas atestilon? *jes/mi kunsendas* (forstreku unu)
Mi interesiĝas pri Lingva Festivalo *jes ( ) ne ( )*

---

Rilate al la konferenca temo mi proponas prelegon kun titolo: ........................................
.......................................................................................................
(la resumo devas atingi la adreson de la Estrarano pri Konferencoj ĝis la 31-a de majo 2005)

Mi proponas la jenan kontribuon al la distra programo:
.......................................................................................................
.......................................................................................................

**La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ jena grupiĝo:**
A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B
B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la ILEI-Kasisto laŭ jenaj vojoj:
a) al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante: "ILEI-Konferenco", nur se vi pagas ĝis la 15-a de majo 2005;
b) al poŝtĝirkonto N° 682117-7, nome de ILEI, Svedio. SWIFT-adreso (BIC-kodo): NDEASESS.
IBAN-numero: SE25 9500 0099 6042 0682 1177. Bv aldoni EUR 8,00 por bankaj kostoj.

Kiun ajn vojon vi elektas por pagi, bv. informi la kasiston tuj kiam vi faras vian pagon: *Sjoerd BOSGA, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås , Svedio, <sjoerd@esperanto.se>*

## POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON, BV. ATENTE LEGI LA SEKVAJN KLARIGOJN:

| Kotizoj en EUR validaj | ĝis 31 mar 2005 (1-a periodo) | ĝis 30 jun 2005 (2-a periodo) | ekde 1 jul 2005 (3-a perido) |
|---|---|---|---|
| Aliĝkategorio | A/B | A/B | A/B |
| 1. Membro de ILEI | 50/30 | 60/36 | 70/42 |
| 2. Ne ILEI-ano | 63/38 | 75/45 | 88/53 |
| 3. Junulo, handikapulo | 40/24 | 48/28 | 56/33 |



## LABORKOMISIONOJ

**Azia agado:** Rob Moerbeek
**Ekzamena:** Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean
**Elekta:** Maritza Gutiérrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
**Kontrola:** Ulla Luin, Bengt Jansson, anstataŭanto: Lars Forsman
**Regulara:** Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
**Terminara:** Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**EEU**: *Eŭropa Esperanto-Unio.* Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
**E@I** (*Esperanto ĉe Interreto, www.ikso.net*), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, *www.tejo.org*, poŝtadreso ĉe UEA)
**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
**IEI:** *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
**UEA:** *Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org.* A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petroviĉ**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.
**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello *Bauco, Chemin de la Civade Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, Francio, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mireille.grosjean@rpn.ch*

## MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Trådragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.*
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*


## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): R. Wylleman, *A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.*
**Presado:** Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
**Redaktejo:** NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5.* Rete: *http://www.ilei.info/ipr/; jozefonemeth@yahoo.com*, tel: *(+36-89) 356-050.* Vicred: *katalin@ikso.net.*
La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: *Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.*
La nunan numeron ni sendis al la presejo la 21-an de jan., **redaktofino por la sekva numero: 15.04 2005.**

## SEKCIOJ

**Albanio:** Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimib@albmail.com*

**Argentino:** Teresita Alaníz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral, *alaniztomas@arnet.com.ar*

**Aŭstralio**: Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelo NSW AU-2550, *penivos@yahoo.com*

**Belgio**: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, *raymond.wylleman@versateladsl.be*

**Brazilo:** Marcos Zlóv Zlotovich, C.P. 2641, BR-01060-970 São Paulo – SP, *ileibr@linguauniversal.com.br*

**Britio:** Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

**Finnlando:** Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

**Francio**: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu, *joseph.catil@wanadoo.fr*

**Germanio:** Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

**Irano**: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *ilei.ir@esperanto.org*

**Italio**: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

**Japanio:** Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

**Katalunio**: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

**Korea Resp.**: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio, *shcho@inha.ac.kr*

**Kroatio/KEL**: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

**Kroatio/KEU:** Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei_kroatio@teacher.com*

**Kubo:** Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

**Nederlando:** Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

**Norvegio:** Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

**Pollando:** Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

**Rumanio:** Mihai Trifoi, Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna, RO-527118 Bixad, *trifoi@honoris.ro*

**Rusio:** Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

**Svedio:** Lars Forsman, Enbarsvagen 17, SE-691 47 Karlskoga, *larsespo@yahoo.se*

**Svislando:** Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

**Togolando:** Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

**Ukrainio:** Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

**Usono kaj Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

**Venezuelo:** Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

## REPREZENTANTOJ

**Armenio:** Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

**Bosnio kaj Hercegovino**: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

**Estonio:** Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

**Islando:** Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

**Israelo:** Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer, *gpsa@uea.org*

**Kongo DR:** Ngangu Nduantoni-Bakidila,B.P.13,CD-Lukala, Bas-Zaïre

**Kostariko:** Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@racsa.co.cr*

**Litovio:** Algimantas Piliponis, Karoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

**Meksiko:** José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

**Portugalio:** João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *jjsantosweb@yahoo.com.br*

**Serbio kaj Montenegro:** Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, SCG-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

**Uzbekistano:** Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *eugeny@gimli.com*